# Israela Esperantisto

## (ANTAŬE "NIA LIGILO")

ORGANO DE ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO (ELI)
Tel-Avivo 61390, Poŝtkesto 39004.
N-ro 52-Oktobro 1974

שנה טובה

La estraro de ELI, JELI kaj redakcio de „Israela Esperantisto" salutas gesamideanojn en la Lando kaj eksterlande kaj deziras al ĉiuj

BONAN, NOVAN JARON! - Jaron de paco, de konstruado kaj abunda enmigrado.

## LA RESUMA REZOLUCIO DE KONGRESO

La 59-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Hamburgo de la 27-a de Julio ĝis la 3-a de Aŭgusto 1974, pritraktante la ĉefan temon de la Kongreso, nome "Naciismo kaj internacia kunlaboro en Nuntempa Mondo," kaj ellaborante la agadon de Universala Esperanto-Asocio por la venontaj jaroj konstatas, ke nur per unueca celkonscia laboro, la Asocio prosperos kaj plue emfazas, ke la principo de aktiva neŭtraleco tia, kia, ĝi estis praktikata en laboro de UEA en la lastaj jaroj, estas la sola ebla vojo por la prosperigo de la Asocio, grava unuiga forto por ĝia laboro kaj plej bona kondiĉo por efika kaj harmonia internacia kunlaboro en la kadro de la Asocio.

o o o o

## GRAVA SCIIGO

Post trimonata paŭzo Esperanto-Ligo en Israelo kaj Junulara Esperanto-Ligo en Israelo rekomencas siajn klubajn vesperojn la 10-an de Oktobro 1974 ĵaŭde je 7.30 vespere. La renkontiĝoj ĉiam okazos en la sama loko je sama tago kaj horo.

La klubejo estas ĉe la strato Ŝimon Hatarsi 6. proksime de kinejo Peer, en domo "Kultura centro por plenkreskuloj". Aŭtobusoj: 1, 4, 5, 13, 24, 25, (vidu suban mapon.)

La 10-an de Oktobro prelegos en nia klubejo gasto de UEA centro en Rotterdamo, multjara estraranino de UEA s-anino M. Vermaas. Ŝi rakontos pri la lasta krizo en UEA kaj respondos demandojn de samideanoj. La samideanoj estas petataj amase viziti tiun vesperon!

La 17 -an de Okt. prel. S-ano Giladi pri UK en Hamburgo.

La 24-an de Oktobro prelegos s-ano Tilleman pri kongresoj de TEJO kaj de SAT.

La 31-an de Oktobro: A. Manor: Politika Situacio.


La 7-an de Novembro: Ester Haroun: Andersen kaj liaj esperantaj tradukoj.

La 14-an de Novembro, S-ano A. Ron:

La 21-an de Novembro, d-ro Maŝler, lumbildoj de lia lasta ekskurso en Eŭropo.


La 23-an de Oktobro komenciĝos kurso en Junulara Centro en Tel Avivo. Bonvolu sciigi d-ron Maŝler pri kandidatoj, kiuj volas lerni.

Por ekstertelavivanoj la korespondan kurson gvidas senĉese Josef Ŝemer. Tel Aviv, p.k. 33147.






## Israela Konsulo en Hamburgo s-ro Kino salutas la Universalan Kongreson en senriproĉa E S P E R A N T O



## IMPRESOJ DE LA KONGRESO

La kongreso ĉi jare okazis en Hamburgo en la novkonstruita kongrescentro kun tre luksa aranĝo. Luksaj tapiŝoj kaj kandelabroj ornamis ĉiujn salonojn. Speciale menciindaj estas akustiko kaj ĝiaj aranĝoj, kiuj estis centprocente perfektaj. Ĉiu kongresano, kie ajn li estis en la salono povis aŭdi prelegojn kaj teatraĵojn senriproĉe.

Hamburgo, kiel aliaj urboj en Germanujo distingiĝas per ekstrema pureco, ĉio aspektas kiel nova ĵus alportita de fabriko.

Antaŭ la kongreso mi pasigis antaŭkongresan semajnon kun 120 geesperantistoj en Elsinoro (Danujo). Estis kun mi du israelanoj.

La grupo faris ekskurson al Svedujo. En Helsingborgo ni estis akceptitaj de lokaj esperantistoj. En miaj salutvortoj mi substrekis, ke en nia lando ĉiam okazis mirakloj kaj la plej granda miraklo estas, ke nia popolo ju pli ĝi estas torturata, des pli ĝi kreskas kaj progresas. Ankaŭ dum la lasta tempo okazas mirakloj. En la jaro 1948, kiam nia ŝtato ekestis, sukcesis ĝi kontraŭbatali kaj venki 3 armeojn de najbaraj landoj, kaj la sama miraklo jam tri foje ripetiĝis. Ni tamen ne volas atendi miraklojn, ni preferas vivon en paco kaj esti sendependa, egala, memstara, membro de la homa familio, same kiel ĉiu alia nacio.

La postkongreso okazis en pitoreska bavaria urbo Kronach. Partoprenis ĝin 140 geesperantistoj, kiuj venis por ripozi post laciga universala kongreso. La pejsaĝo de Kronach similas al tiu de Svisio. Ĉie oni vidas riveretojn, montojn, arbarojn, florojn kaj ĝardenojn. La urbestraro aranĝis solenan akcepton por gastoj de 19 landoj. En miaj salutvortoj mi inter aliaj diris "nia popolo suferis multe dum la dua mondmilito. Mi tamen kredas pri nova Germanio kaj dum la lastaj jardekoj evidentiĝis, ke tiu kredo estas ĝusta."

J. Giladi



## PERSONAJ RIMARKOJ PRI UK

La plej fortan impreson dum la UK faris la lasta parolado de prez. I. Lapenna. Mi ne volas ripeti liajn argumentojn, kiuj estis sufiĉe konvinkigaj. Ke lia tuta agado, lia sinteno trovis komprenon ĉe kongresanoj, atestis la aplaŭdoj, kiujn li ricevis. Ili daŭris malgraŭ la peto de estraro fini ilin, ĉar la la salono devas esti malplenigita por la purigistoj. Ili ne volis ĉesi, eĉ kiam Lapenna mem petis ilin fini. Poste ekregis inter la kongresanoj malĝojo: ia ne klara, kiu venos? kio venos? ĉu nova estraro atingos la altecon de la malnova prezidanto?

Estis ankaŭ liaj kontraŭuloj. Ilin ni ne aŭdis. Ni ĝis la fino ne sciis, ĉu la nova estraro havas iun novan planon de agado. Estas novaj homoj, kongresanoj foriris ne sciante, kiel aspektos la laboro post la erao de Lapenna.

o o o o

Tre fortajn aplaŭdojn ricevis israela konsulo s-ro Kino, kiu en senriproĉa esperanta elparolo salutis kongreson. Salutis UK ankaŭ aliaj 18 reprezentantoj de aliaj registaroj. Kelkaj de ili ankaŭ en Esperanto, sed neniu de ili ricevis tiel longajn kaj fortajn aplaŭdojn. Ĉu hazardo?

o o o o

Ne ĉiam mi estis tiel fiera. La gazetara servo de LKK en Hamburgo sciigis pri la esperantaj salutoj en sia raporto en esperanto, pri ambaŭ esperante salutantoj. En la germana eldono oni forgesis pri israela konsulo... Ĉu hazarde? Mi serĉis klarigon, demandis unu LKK-anon, kiu post iom da tempo respondis, ke li ne havis tempon ricevi respondon pri tiu afero.

o o o o

Kun plezuro mi devas konstati, ke la pola salutanto unuan fojon parolante pri Zamenhof diris nia samlandano, ne kiel ĝis nun- samnaciano, aŭ Polo.

En la germanaj ĵurnaloj tamen oni sciigis pri la Polo Zamenhof...

o o o o

La Uk komenciĝis per severa akcidento. antaŭ la enirejo al la Junulara Domo, kie loĝis multaj

kongresanoj, per trafikakcidento estis mortigita juna kongresanino-nederlandanino. Ĝi kaŭzis malgajan etoson en la komenco de UK. Dum la esp. Di-servo oni dediĉis preĝon por ŝi.

o o o o

Multaj renkontiĝoj, la malnovaj kaj novaj konatuloj. Multe da ĝojo, kiam konatuloj renkontiĝas. Iam tamen malagrablaĵo... Oni konas tiun ulon kaj ne memoras, kiu li estas kaj de kiu lando. Ĉu ne estus bezone por eviti tiujn malagrablaĵojn doni al ĉiu kongresano alpinglaĵon sur bruston kun la nomo kaj lando de kongresano?

o o o o

Renkontiĝoj kun Judoj: bedaŭrinde malmultaj ili estas nuntempe krom israelanoj. Mi renkontis 3 krom israelanoj. De ili 2 malnovaj konatuloj. Unu kuracisto de Londono kaj profesoro de Jugoslavio. Nova estis por mi juna usonano T. Goodman. Ni havis tre interesan kaj agrablan interparolon, kiu finiĝis per donaco por ELI de 20 dolaroj.

o o o o

La kuracista kunveno finiĝis per vizito en la fama tropika instituto. La granda kaj moderna domo enhavas ĉiujn sciencajn bezonaĵojn por kuraci la homojn, kiuj pro la rapida trafiko en la mondo alportas malsanojn, kiuj estis konataj nur en Afriko kaj orienta Azio. Mi estis iom mirigita per tio, ke en la hospitalo estas loko por tifmalsanuloj. Tifo estas malsano de ne evoluitaj landoj sed ne tropika...

Mi estis ankaŭ mirigita por la severa izolado de malsanuloj. Ĉe ni similaj malsanuloj povas kontaktiĝi kun familio, ricevas vizitojn de ekstero kaj ili ne kaŭzas infektojn.

o o o o

Mi tre impresiĝis pri akurateco de germana organizo. Ĉiuj prelegoj teatraĵoj komenciĝis akurate. Ankaŭ la tramoj kaj aŭtobusoj venis ĉiam laŭ minuto akurate. Mi memoras, ke iam mi demandis iun, kiu atendis tramon, kiam ĝi venos. La respondo estis, post la rigardo la horloĝon: post duon-minuto... jen jam oni ĝin vidas.

H. Maŝler



Dum la Universala Kongreso (UK) en la kunsido, dum kiu oni pridiskutis la problemon "Kion fari kontraŭ perdo de membroj?" samideano J. Giladi amuzigis la kunvenon per sia versaĵo, kiun ni malsupre citas:

## KIAL ONI ĈESAS VENI AL LA KLUBO

Samideano Atara
Estas tre avara.
Li metas ĉiun groŝon
Profunde en la poŝon.
Al la klubo li venas,
Kiam oni lin ne ĝenas.
Li tre ŝatas lumbildojn
Ne gravas kiujn,
Sed estas mallumo,
Oni vidas neniun.
Nek la peranton,
Kiu serĉas abonanton,
Nek la kasiston,
Nek lian persiston
Pri kotizoj, pagoj
Kaj similaj agoj.
Ĉu ili ne scias,
Ke "Time is money"?
Tamen tempon
Ni povas doni.
Sed ankaŭ pagi
Ankaŭ suferi-
Tion mi ne povas toleri..

Samideanino Daniela
Estis iam tre bela.
En la klubo ŝi
Ne ofte aperas,
Aliajn okupojn
Ŝi preferas.
Sed, ĉar oni anoncis
Pri interesa programo:
Prelego pri l'pilolo,
Aŭ pri amo...
Du horojn ŝi staris
Antaŭ la spegulo,
Faris la brovojn,
Pudris makulon.
Vestis la plej belan
Plej belan kostumon,
Uzis la
Karan perfumon,
Kaj neniu esprimis
Ium varman senton.
Neniu eĉ faris
Al ŝi komplimenton,
Nu: Ĉu estas ili kavaliroj?
Ĉu entute
Estas ili viroj?...
Karaj geamikoj,
Ne helpos vokoj,
Ne helpos predikoj.
Se vi volas
La rondon teni,
Ni devas ĝin
Pli bone kompreni.
Laŭdu ĉiun parolanton
Aplaŭdu ĉiun deklamanton.
Se li estas
Instruisto, instruktoro-
Nomu lin tuj: "Profesoro",
Se li estas
Inĝeniero, universitatano-
Nomu lin: "Akademiano".
Kun la dua sekso
Kondutu laŭ jena kodekso:
Diru ke
Vi ŝin admiras,
Pri ŝi ĉiam meditas
Kaj ŝian atenton
Vi meritas.
Prenu ŝin al fora angulo,
Rakontu sekreton
Pri iu konatulo.

Ni ja estas familianoj
Ne nur gesamideanoj
Kaj ĝis "Amo kaj vero
Regos sur tero"
Floru kaj kresku
Nia afero...

J. Giladi

J.E.L.I angulo

## RAPORTO PRI LA 30-a I.J.K., MÜNSTER

La 30-a Internacia Junulara Kongreso okazis en la bela urbo Münster de la 3.8. ĝis la 10-a.8.74. La urbo havas multajn vidindaĵojn precipe historiajn. Partoprenis ĝin 250 junuloj de 32 landoj, inter ili estis ankaŭ unu irakano. Israela delegacio ne havis kun li kontakton.

Malgraŭ multaj fortstreĉoj kaj penoj la organizo ne estis perfekta. Mankis ĉambroj estis ankaŭ aliaj miskomprenoj, kies solvo venis nur malfrue vespere. Poste tamen ĉio estis en ordo.

La ĉambroj en la studentaj domoj estis komfortaj, sed disĵetitaj en la urbo.

La ĉefa temo de IJK estis "Lingvo kaj Socio", eksperimente kunlaboris pri ĝi esperantistoj kaj neesperantistoj. Aliaj pridiskutitaj temoj estis: "Junularo kaj edukado", "Junulara politiko," "Kibernetiko kaj instruado," La flankaj temoj estis: "Elokventeco kaj retorika edukado," "Edukado al paco," "Laborplano de Tejo",

Menciinda estas la solenaĵo en "La Kastelo", apartenanta al la universitato. Tie okazis malfermo, en kiu salutis la kongreson nova UEA prezidanto d-ro Tonkin. Li diris inter aliaj, ke esperanto bezonas por sia evoluo gajecon. Oni realigis la saman tagon lian proponon en bonhumora babilado dum drinkvespero. Ankaŭ la kunsidoj estis en sia plimulto bonhumoraj.

Kiel prezidanto estis elektita denove s-anino Flora Szabo.

La lasta tago estis ekskursa tago, kiun oni dediĉis por la propagando, farante impresigan komunan marŝon kun esperanta flago tra stratoj de urbeto Burgsteinfurt. Ĝi okazis hazarde kun germana popola festo "Ŝicenfesto"-Festo de pafado-kun dancoj kaj muziko kaj la reĝo de festo estis nomata reĝo de TEJO.

Junularo en Münster montris, ke estas eble kunigi seriozajn debatojn kun gajeco, ĝojo kaj bohhumoro. Dum la fino multaj esprimis sian volon ree renkontiĝi venontjare.

Amri Wandel



## LA VERON ONI NE POVAS DIVIDI

La ĉefa eco de la progresema kultura homo estas la ĝusta kaj preciza distingo inter la faktoj kaj ĝeneralaj opinioj. Ni kredas al opinioj, nur kiam la faktoj verigas ilin. Tio rilatas ĉiujn honestajn homojn kaj inkluzivas esperantistojn.

En la lasta tempo ni ricevis la kvaronjaran organon de vjetnama pacdefenda esperantista asocio (numero 3-4, 1973), kiu enhavas deklaracion pri la situacio en mezoriento kondamnantan la "israelan agreson" kontraŭ la arabaj ŝtatoj en oktobro 1973. Kaj jen la perloj:

"Kune kun la tuta vjetnama popolo, vjetnamaj geesperantistoj sekvas kun profunda intereso la gravegan tension en mezoriento kaŭzitan de la agresantoj de Israelo... Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, en la nomo de ĉiuj vjetnamaj geesperantistoj, solene proklamas sin ĉe la justa flanko de la arabaj popoloj kontraŭ la israelaj agresantoj."

Ni do demandas la vjetnamajn esperantistojn: Ĉu vi ne scias la veron, kiun la tuta mondo scias, ke ne Israelo atakis la arabajn ŝtatojn, sed ili atakis Israelon en la plej sankta juda festotago. Egiptio kaj Sirio ne ĉesas fanfaroni, kiel ruze ili atakis Israelon kiel kaŝe ili preparis la atakon kontraŭ la juda ŝtato por ekstermi ĝian loĝantaron.

La dua „vero", kiun disvastigas la vjetnamaj „pacamantoj" estas, ke Israelo atakis la arabajn ŝtatojn, ĉar USONO instigis ĝin al tiu paŝo.

Do, kiel diskreviĝis kiel balono la unua trompo, ke ni atakis Egiption kaj Sirion, diskreviĝis ankaŭ la dua senhonta mensogo, ke USONO incitis nin proklami militon kontraŭ la arabaj ŝtatoj.

De alia flanko ili kaŝas intence la fakton, ke se la brutala rusa Imperialismo ne incitus la arabajn ŝtatojn kontraŭ Israelo, regus jam de longe paco en nia regiono. Ruslando sendas seninterrompe al faŝistaj arabaj ŝtatoj la plej novajn armilojn por miliardoj da dolaroj, ĝi sendas ankaŭ milojn da teknikistoj kaj oficiroj

Resume: Se tio estas la „vero", kiun disvastigas

la regantoj de Hanojo pri Israelo , kiel ili volas, ke ni kaj la progresiva mondo kredu al ili, ke ĉio kion ili publikigas pri siaj agoj estas vero?!

M.

o o o o

## DE MUSOLINI ĜIS KADAFI

### Interligo de faŝismo kaj palestinaj teroristoj.

Kadafi libia diktatoro havas bonegajn rilatojn kun dekstraj ekstremuloj en Italio. Li instigas ilin por propagandi kontraŭ Judoj kaj kontraŭ Israelo. Li helpas akiri kaj transporti armilojn al Eŭropo.

En flughaveno en Eŭropo en Romo oni trovis valizojn kun raketoj de libia deveno kaj en Francio ĉe itala ŝtalimo aŭtomobilon plenan de armiloj. Libio mone subtenas faŝistajn movadojn en Italio kaj faŝistaj teroristoj ĉiam trovas kaŝejon en Libio. Estas ankaŭ pruvoj, ke italaj faŝistoj kunlaboras kun sekreta polico de Libio.

o o o o

## GRAVA NOVAĴO

Kirklanda Esperanto-Centro, USONO, ekeldonos septembre novan revuon "JUDA ESPERANTISTO", kiu celas la tutan mondan judaron parolantan esperante, kaj ĉiujn aliajn interesitojn. KEC ankaŭ eldonas aliajn novajn revuojn, librojn ktp. Por informiĝi kaj aboni skribu tuj al KEC, 1856 Third St, Kirkland, WA 98033



## DANĜERO POR DEMOKRATIO

En la manoj de la arabaj ŝtatoj produktantaj nafton amasiĝas kapitalo, kiu atingis jam 20 miliardojn da dolaroj kaj en la jaro 1985 atingos 1000 miliardojn da dolaroj.
Ekonomia potenco kreskis sen simila antaŭa ekzemplo pli ol de ĉiuj demokrataj ŝtatoj en la mondo kune. Tio estas dekoble pli ol ĉiuj investicioj de USONO eksterlande ĝis hodiaŭ, kaj centoble pli, ol la tuta valoro de la oro en USONO. Nur Saŭdio-Arabio havos en tiu jaro pli da rezervoj da valuto kaj oro ol USONO kaj Japanio kune.

Kresko de prezoj en evoluitaj landoj dum la lastaj jaroj atingis 70%, kresko de prezo de nafto en la sama tempo atingis 730%.

La malriĉaj landoj ne povas pagi por la bezona energio. Preskaŭ ĉiuj landoj havas komercan deficiton, pro la plialtiĝanta prezo de nafto kaj ĝi kaŭzas ĥaoson ekonomian kaj minacas ekonomia krizo.

Tiu perspektivo ŝanĝas la tutan mondan ekonomion. Araboj povas aĉeti plimulton de la tero kaj industrio de demokrata mondo kaj per sia mono influi gazetaron, radion kaj televidon.

Estas klara la forta influo de tiu mono en manoj de diktatoroj-je demokratio. Oni jam komencis subaĉeti gazetistojn, politikistojn kaj eĉ tutajn ŝtatojn, kiuj pro la mono konsentas vendi siajn idealojn kaj honoron.

A.M.

## LOĜANTARO DE ISRAELO 3.400.000

La centro de statistiko sciigis antaŭ la Nova Jaro, ke loĝantaro de Israelo atingis nombron de tri milionoj kaj kvarcent mil. La juda loĝantaro trapasis du milionojn kaj naŭcent mil, aliaj-duonon de miliono.

o o o o

Turista angulo

## Arkeologia terkulturado

En Israelo vidindaĵoj estas ofte kunligitaj kun iliaj sociaj, religiaj aŭ historiaj signifoj. Ne sufiĉas ekz. montri kibucon por kaŭzi interesiĝon pri ĝi, oni devas klarigi ĝian socian strukturon kaj ĝiajn problemojn.

100 km suden de Beer-Ŝebo en la koro de dezerto Negev troviĝas stranga vidindaĵo: restaĵoj de la urbo Avdat kun verdaj kampoj kaj ĝardenoj malsupre. Neniu akvotubo gvidas tien por akvigi la teron. Laŭ la sciencaj provoj de agrikulturistoj la terkulturado povas sukcesi, se la kvanto da pluvo trapasas jare 400 mm. En tiu regiono la pluvoj donas nur 80 mm.

Avdat estas unu de 3 urboj, kiu apartenis al la gento Navatoj, kiu havis en tiu dezerta cikaŭaĵo ŝtaton, kiu florante travivis 1000 jarojn de post la tempo de Aleksandro la Granda, ĝis la 7-a jarcento p.K.. Tiu ŝtato evoluis kulturon kaj prosperis malgraŭ tre malfavoraj kondiĉoj. La bonfarto de tiu ŝtato dependis de la komerco, ĉar tie trapasis la vojo de la Persa Golfo kaj Hindujo al Egiptio. Sed ĝis nun ne estis klare, de kie venis la akvo kaj nutraĵo por la sufiĉe multnombra loĝantaro de Navata ŝtato.

Profesoro Ben-Ari de la jerusalema universitato volis respondi tiujn demandojn kaj komencis esplori "arĥeologian" terkulturadon. Li venis al Avdat, mezuris la kvanton de pluvo, sunradiadon kaj la grundon.

Evidentiĝis, ke ne nur la kvanto da akvo ne estis sufiĉa por terkulturado sed ankaŭ la tavolo de loeso estis en tiu ĉirkaŭaĵo nur 5 cm dika kaj sub ĝi estas roko kaj ankaŭ ĝi ne sufiĉas por terkulturado. Li trovis tie strangajn staketojn de ŝtonoj kolektitajn de ĉirkaŭanta supraĵo kaj restaĵojn de kanaletoj kaj digoj.

En la komenco, la afero tute ne estis klara. Ĝis nun geologio instruis nin, ke oni ne devas forigi ŝtonetojn kaj kreskaĵojn de montdeklivoj, ĉar ĝi faciligas erozion kaj se ili mankas la pluvo forlavas la teron kaj restas nudaj rokoj. Kial do niaj praŭloj forigis la ŝtonojn de la supraĵo kaj permesis forlavi la loeson? La profesoro trovis respondon: Navatoj volis, ke la loeso estu forlavita de la deklivoj, por ke ĝi amasiĝu en la valo malsupre. Kaj vere evidentiĝis, ke en la valo la tavolo de la tero atingis 50 cm; tiu kvanto jam sufiĉas por terkulturado. Ĝi ankaŭ klarigas la problemon de akvomanko. La malmultaj pluvoj sed tre abundaj, ne estas ensorbitaj en la rokon, kiu restis post forlavado de tero, kaj en multaj torentoj la akvo falas malsupren por akvigi amasigitan teron en valo. La homoj nur devas zorgi pri digoj, kiuj fermu la valon. Li rekonstruis laŭ la ŝpuroj la digojn. La profesoro prikalkulis la bezonatan akvon. Li trovis, ke por terkulturado oni bezonas 35 hektarojn de supraĵo por sufiĉe akvigi unu hektaron. Tre granda malŝparo por hodiaŭa tempo, sed tiam oni ne kalkulis laŭ ekonomiaj reguloj. La konstruitaj digoj ankaŭ havis taskon gardi la teron kaj vilaĝon de inundoj.



La profesoro kun siaj studentoj rekonstruante la kanalojn kaj la digojn laŭ la maniero de antaŭ 1500 jaroj kaj eĉ eble de antaŭ 2800 jaroj, kiam la reĝo Salomono setligis tien siajn civitanojn, ree revivigis la dezerton. Nun post 14 jaroj de malfacila laboro prof. Ben-Ari rikoltas bonegajn fruktojn en la kvanto de 50 kg de unu fruktarbo, kaj grenon 9000 kg de unu hektaro. Li rikoltas eĉ fruktojn kaj legomojn, kiuj en tiu tempo ne estis konataj.

La profesoro laboras vintre kaj somere. Dum la vintraj inundoj li per siaj fortoj portas sakojn da sablo por ŝtopi la truojn en la digoj, rekonstruas ĉiujare la kanalojn kaj somere pruvas, kiuj vegetaĵoj sukcesas en tiuj kondiĉoj. Li ankaŭ reelfosis multajn truojn en la rokoj, kie Navatoj kolektis la akvon por trinkado en la somero.

Klare estas, ke tiu malŝpara terkulturado ne havas hodiaŭ iun ekonomian signifon, ĝi helpas nur al historiistoj klarigi, ke ne nur per militoj kaj militantaj ŝtatestroj evoluis la lando. Severa laboro ebligis en tiu tempo evolui tre interesan kulturon, kiu travivis multajn aliajn kulturojn en pli favoraj kondiĉoj.

H. Maŝler

| PORTU MIAN ANIMON ... | Ŝimon Ŝmuel Frug<br>POEZIO KAJ PROZO |
|---|---|

Portu mian animon en bluon de l'for',
Kie stepo orumas libere sublima,-
Vasta, kvazaŭ senfino de mia angor',
Kvazaŭ mia malĝojo senlima.

Varman kredon kaj revojn mi vekos en kor',
Kaj la sonĝojn iamajn kaj helajn esperojn.
Sopiranta animo elverŝos en plor',
Veon de la miljaraj suferoj.

Mi la kordojn sonorajn tuŝetos kun plor',
Kaj sonar' forgesita ekfluos torente.
Al la stepo libera pri mia dolor'
Brulaj larmoj rakontos lamente.

Portu mian animon en bluon de l' for',
Kie stepo orumas libere sublima, -
Vasta, kvazaŭ senfino de mia angor',
Kvazaŭ mia malĝojo senlima.

Esperantigis Ŝmuel Mizeruĥa

## ELI GRATULAS

Sincerajn gratulojn, dezirojn de sano, forto kaj energio por daŭra aktiveco esprimas al s-ano Josefo Wohlberg delegito de UEA en Natanjo pro la honorigo lin.

Pro lia senĉesa 55-jara cionista aktiveco oni decidis la enskribon de s-ano Josefo Wohlberg en la "Oran Libron" de Israela Nacia Fondo (Keren Kajemet Leisrael.) S-ano J.Wohlberg estas membro en
בריות ראשונים,en ברית אסירי ציון k.t.p. Li estis siatempe plurfoje enkarcerigita (multajn jarojn) pro sia subtera cionista aktiveco kiel membro en la centra komitato de la cionista organizaĵo en Transilvanio, pro la sufero kaj lukto en intereso de la cionismo. Li ricevis 2 honorigojn:1/ "עלב"
( עיטור לוחמי המדינה 2/ אות ההגנה

**Estraro de ELI**



## VIDALVIDE AL LA MORTO

### DU RAKONTOJ

Vidu kiel granda estas la diferenco inter la franca homo kaj la rusa.
Okazintaĵo de la tagoj de franca revolucio:

Laboristoj en Parizo kaptis sur la strato pastron, kontraŭulon de la revolucio. Memkompreneble ili tuj volis pendigi lin sur la fosto de la lanterno.

-Bonaj civitanoj, kion vi volas fari? demandis la pastro kun timo.

--Ni volas pendigi vin, estis la respondo.

- Kaj vi supozas, ke kiam vi pendigos min sur la lanternfosto pligrandiĝos via lumo? demandis la pastro ironie.

Lia trafa respondo plena de seka humoro, elvokis tiel grandan miron, ke ili lin tuj liberigis.

o o

o o

En la tempo de la rusa revolucio, en policejo de Harko la absoluta potenco estis en la manoj de policestro Sajenko. Ne pasis eĉ unu tago, ke li mem ne mortpafu kelkajn homojn en la policejo. Post kiam li ebriiĝis vespere, li iris al arestejo. Li tenis la liston de kiu li legis la nomojn de la venontaj viktimoj. La vokitaj ekstaris de la kestoj, kiuj servis kiel litoj nokte kaj kiel seĝoj tage, kaj silente stariĝis flanke laŭ ordono. Neniu eĉ pruvis peti kompaton, ĉar ili sciis, ke pli facile estas movigi pezan ŝtonon ol la koron de policestro.

Iam tamen okazis, ke Sajenko enirante kun la listo komencis legi:

- Akinko!

-Estas.

- Staru flanken! Vasjukov!

-Mi troviĝas.

-Staru tie! apud la antaŭa viktimo.

-Lasu al mi diri, ke... diris Vasjukov.

-Ne parolu! Ekkoleris Sajenko. Mi ne havas tempon diskutadi kun vi.

-Moloĉanov!

-Troviĝas.

-Nikolski!

-Neniu respondis.

-Nikolski! Ripetis Sajenko.
-Neniu respondas. Ĉiuj silentis, tiuj kiuj staris en la flanko kaj kiuj sidis sur la kestoj. Nikolski mem sidis fronte de Sajenko kvazaŭ ne pri li, li parolis. Li metis piedon sur piedon, tordis dikan paperon por fari cigaredon, per sia lango li ĝin malsekigis, por glui ĝin, kaj nur poste li diris neglekte, tirante ĉiun vorton, kvazaŭ ne volante paroli:
-Kamarado Sajenko, kio okazis kun Vi? Vi volas mortpafi unu homon dufoje? Vi jam pafis al Nikolski hieraŭ.
-Vere? La diablo kun vi! balbutis Sajenko kaj forstrekis la nomon Nikolski.
-Oni devas esti singardema, oni devas esti preciza... diris Nikolski.
-Ne daŭrigu parolaĉi! Koleris Sajenko, kaj tuj vokis alian nomon.
Post du tagoj liberiĝis Nikolski.
Povas esti, ke al vi plaĉas la franca pastro, mi preferas la ruson Nikolski. Certe la dentoj de la pastro klakis, kiam li parolis sian ruzan sentencon. Kontraŭe Nikolski tute ne ekscitiĝis, kiam li rigardante rekte en okulojn de Sajenko, kun li parolis. Se estus en lia vizaĝo iu esprimo de maltrankvileco, li jam de longe estus al "alia mondo".

A. Averĉenko
mallongigis kaj tradukis A.Manor

o o o o

Politiko similas matematikon. Nulo havas nur signifon, se ĝi ne staras en la komenco.

o o o o

Bona armeestro ne havas malbonajn soldatojn.
(ĉina proverbo)

o o o o

La nomo de "Israelo" estis menciita unuan fojon en la jaro 1220 a.K. en la poemo "Venko" de la egipta reĝo Marnaftah.

o o o o



## PRELEGOJ EN LA KLUBEJO

K. Perlman — Virinoj en la norda poluso
J. Rabino — Kiamaniere la pezgardantoj evitas grasiĝon
d-ro H. Maŝler—Grasiĝo de la medicina vidpunkto
Ben-Alter — La dek ordonoj de Dio
A. Manor — Judoj en Lando de Israelo (historio)
H. Maŝler — Diversaj tipoj de kurachelpo en mondo.
Alberg — Diversaj instrumetodoj
Eksterlandaj gastoj: ĉefedelegito de Germanio
Hirscn — Lumbildoj de Germanio
F. Simonet — Laboro por Esperanto en Vjetnamio

o o o o

## ŜCIIGOJ

De la komenco de Julio ĝis la deka de Oktobro ĉi jare estis nia klubejo fermita. La kaŭzo ne estis forigebla per ELI. La domo "Bejt Lesin " estis fermita kaj ELI ne scipovis facile translokiĝi en alian lokon.
La nova loko en la str. Ŝimon Hatarsi 6, estas situita en sufiĉe granda salono, kiu estos ankaŭ bona por niaj solenaĵoj (Zamenhofa Vespero kaj Landa Konferenco.) La domo apartenas al nia urbestraro, kiu donas ĝin por nia uzo senpage. La aliro ĝis tiu domo estas facila, ĉar pli aŭ malpli proksime venas tien 6 aŭtobusoj.
La 10-an de Oktobro komenciĝos ankaŭ la kurso por perfektiĝantoj.

o o o o

S-anino Frida Drezner grave malsaniĝis kaj ĝis nun kuŝas en malsanulejo. ELI deziras al ŝi baldaŭan resaniĝon kaj revenon al nia klubejo.

o o o o

La Universalan Kongreson en Hamburgo vizitis: J. Giladi, J. Rabino. A. Wandel, H. Maŝler, Isakov J. kaj J. Tillman. Pagis por la UK ankaŭ D. Wunderbaum kaj ges-anoj Drezner, sed ili ne scipovis partopreni ĝin.

o o o o

Seminarion en Danlando partoprenis A. Wandel, Ĵ. Isakov kaj J. Giladi.

o o o o

Postkongreson en Kronach partoprenis J. Giladi.

o o o o

Kongreson de SAT partoprenis J. Tillman

o o o o

Kongreson de TEJO en Münster partoprenis A. Wandel kaj J. Tillman .

o o o o

M. Ben-Porat revenis de eksterlando post unu jaro foresto. ELI salutas lin kaj lian edzinon Liora. Ni esperas, ke post la reveno ges-anoj Ben-Porat rekomencos sian konstruivan laboron por nia movado.

o o o o

## RICEVITA LIBRO

Nova teatro, Monologoj, Emilia Lapenna. eld. KEL 1974. 55 p. Tre gajaj monologoj por la ne multnombra teatro.



## NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

En la lasta tempo ni ricevas sufiĉe grandan kvanton da leteroj kaj ni ne eblas ĉiujn citi. Ni elektis nur unu, kiu nin pli ol aliaj impresis.

"Nov-zelanda Esperantisto" red. H.W.R. Peterson skribas:

"La estraro de NZEA ĉiam tralegas Vian revuon kaj poste ni sendas ĝin ĉirkulere al niaj kluboj kaj grupoj. Ĝi ĉiam provizas aktualan kaj interesan skizon pri aferoj en via lando, por kiu la granda plimulto de nov-zelandanoj havas grandan simpation kaj admiron. Ni rimarkas, ke la N-ro 50 estas aparte enhavoriĉa kaj leginda.

Ni deziras al vi daŭran sukceson en via por-Esperanta laboro kaj pacon kaj feliĉon por via heroa lando."

la 25-an de aŭgusto 1974.

o o o o

האספרנטיסט הישראלי, בטאון הליגה לאספרנטו בישראל
תל-אביב ת.ד. 39004
חוברת 52-אוקטובר 1974 - בעריכת אלכסנדר מנור

o o o o

ENHAVO


| | | |
|---|---|---|
| La resuma rezolucio de UK | 1 | |
| Impresoj de la Kongreso | 4 | J. Giladi |
| Personaj rimarkoj pri U.K. | 5 | H. Maŝler |
| Kial oni ĉesas veni al la klubo | 7 | J. Giladi |
| J.E.L.I. angulo | | |
| La trideka I.J.K. | 8 | A. Wandel |
| La veron oni ne povas dividi | 9 | M. |
| De Musolini ĝis Kadafi | 10 | |
| Danĝero por demokratio | 11 | A.M. |
| Turista Angulo | | |
| Arkeologia terkulturado | 12 | H. Maŝler |
| Poezio kaj prozo | | |
| Portu mian Animon | 14 | Ŝ. Ŝ. Frug (trad. Ŝ. Mizeruĥa) |
| Vidalvide al la Morto | 15 | A. Averĉenko |
| Prelegoj en la klubejo | 18 | |
| Niaj legantoj skribas | 19 | |
| Sciigoj | | |


Redakta komisiono:
J. Giladi
D. Wunderbaum
Redaktoro
Aleksander Manor